# *Post unu semajno pozitive evoluas la klinikaj provoj de Soberana 02*



Havano, mar 15 (RHK) Kubaj a?toritatuloj de publika sano elstarigis ?i-lunde la pozitivan evoluon de la unua semajno de la klinikaj provoj de Soberana 02 en Havano.

Dum kunsido de la provinca konsilantaro oni informis ke en 230 konsultejoj de la kuracisto kaj flegistino de la familio, oni havis la ?eeston de volontuloj super 90% el la kunvokitoj.

Oni anka? informis ke cele al la vakcina procezo, kiam la studoj estus finitaj, oni funde pritaksos la kondi?ojn de ?iuj vakcinejoj en la urbaj poliklinikoj rilate al kapacitoj, stokejoj kaj konservejoj.

Same oni pritraktis la celon kreskigi la nombron da klinikaj ejoj starigitaj, ?is nun 48, en lokoj kun tiaj ebloj.

En la nuna etapo oni preparis la vakcinejojn en lernejoj, klinikoj a? ejoj de stomatologio kaj rehabilitigo, Avo-domoj kaj aliaj sancentroj.

Fonto: ACN

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/250731-post-unu-semajno-pozitive-evoluas-la-klinikaj-provoj-de-soberana-02

Radio Habana Cuba